ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 7-9/2014

Julio-Septembro 2014

**JARKOLEKTO 111 - N. 1116-1118 - Julio/Septembro 2014**
*Finpresita la 30.09.14* — Finito di stampare il 30.09.14

**Sur la kovrilo:** *Mons-ro Luigi Bressan, episkopo de Trento, afable interparolas kun la prezidantoj de KELI, Philippe Cousson, kaj de IKUE, Giovanni Daminelli, dum sia vizito al la 20-a EEK (v. p. 53).*

## ENHAVO

**SEMADI DIVIDON NE ESTAS KRISTANECA,**
**AL LA EKLEZIO APARTENAS UNUECO**
Katekizo de Francisko de la 27-a de Aŭgusto 43

**100-a DATREVENO DE LA EKSPLODO DE LA 1-a MONDMILITO**
"La milito detruas, ĝi estas frenezaĵo": la Papo en militaj tombejoj 45
Claudius Colas, la IKUE-pioniro pereinta dum la 1-a mondmilito 46

**LA DUA VATIKANA KONCILIO KAJ ĜIA SIGNIFO**
**POR LA RILATO DE LA EKLEZIO AL LA JUDARO**
Dua parto - Temo de la koncilio kaj la historio de ĝia efikado 48

**LA 20-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO**
Trento (Italio) de la 16-a ĝis la 23-a de Aŭgusto 53

**LA TURO DE DAVIDO** 58

**MOVADE** 59

**LEGANTOJ SKRIBAS** 59

**RENKONTIĜO EN PILGRIMLOKO SVATÝ KOPEČEK** 60

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

*Katekizo de la Sankta Patro Francisko dum la ĝenerala aŭdienco de la 27-a de Aŭgusto 2014 en Placo Sankta Petro.*

# SEMADI DIVIDON NE ESTAS KRISTANECA, AL LA EKLEZIO APARTENAS UNUECO

Bonan tagon, karaj gefratoj! Ĉiam, kiam ni renovigas nian kredkonfeson kaj recitas la Kredon, ni konfesas, ke la Eklezio estas "unu" kaj estas "sankta". Ĝi estas unu, ĉar ĝi havas sian devenon en Triunua Dio, kiu estas mistero de la unueco kaj plena komuneco. La Eklezio estas ankaŭ sankta, ĉar ĝi estas bazita sur Jesuo Kristo, ĝi estas vivigata per lia Sankta Spirito, ĝi estas surverŝita per liaj amo kaj savo. Sed kvankam ĝi estas sankta, samtempe ĝi estas formata el pekuloj – el ni ĉiuj, kiuj ĉiutage spertas niajn malfortecojn kaj niajn mizerojn. Tiu kredo, kiun ni konfesas, nin instigas al konvertiĝo, al kuraĝo strebi al unueco kaj sankteco ĉiun tagon denove, kaj se ni ne estas unuecaj kaj ne estas sanktaj, tio okazas ĉar ni ne estas fidelaj al Jesuo. Sed Li, Jesuo, ne lasas nin solajn, Li ne forlasas sian Eklezion! Li iras kun ni, Li nin komprenas. Li komprenas niajn malfortecojn, niajn pekojn, pardonas al ni – konstante ni bezonas sperti lian pardonon, ĉu mi ne pravas? Sed Li estas senĉese kun ni helpante nin, ke ni estu malpli pekuloj, kaj pli sanktaj kaj en reciproka unueco.

Unuan konsolon en nia strebado donas al ni la fakto, ke Jesuo tiom preĝis por la unueco de la disĉiploj. Ĝi estas la konata preĝo dum la Lasta Vespermanĝo, kiam Jesuo petis: "Patro, ke ili estu unu". Li preĝis por la unueco kaj Li faris tion ĝuste kiam alproksimiĝis lia Pasiono, kiam Li sin preparis por oferi sian vivon por ni. Ni estas instigitaj denove legi kaj mediti tion en unu el la pli fortaj kaj kortuŝaj tekstoj de la Evangelio laŭ Johano, tiu de la 17-a ĉapitro *(kp. 17,11.21-23)*. Kiel estas bele scii, ke Jesuo, nemulte antaŭ sia morto, ne zorgis pri si, sed pensis al ni! Kaj



en sia angora interparolo kun la Patro Li ĝuste petis tion, ke ni estu unu kun Li kaj inter ni. Jen: ĝuste per tiuj ĉi vortoj Jesuo iĝis nia propetanto ĉe la Patro, por ke ankaŭ ni povu eniri en plenan komunecon de amo kun Li; samtempe Li postlasas al ni tiujn vortojn kiel sian spiritan testamenton, por ke la unueco estu pli kaj pli la distinga signo de niaj kristanaj komunumoj kaj la plej bela respondo al ĉiu, kiu demandas pri la motivoj de nia espero *(kp. 1 Pet 3,15)*.

Unueco. "Ke ili ĉiuj estu unu, kiel Vi Patro estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni, por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis" *(Joh 17,21)*. Dekomence la Eklezio klopodis realigi tiun intencon, kiu al Jesuo tiel forte kuŝas sur la koro. La Agoj de la Apostoloj memorigas al ni, ke la unuajn kristanojn oni povis ekkoni laŭ tio, ke "ili estis unukoraj kaj unuanimaj" *(Ago 4,32)*; la apostolo Paŭlo poste instigis siajn komunumojn al tio, ke ili ne forgesu, ke per la bapto ili kune kreas "unu korpon" (1 Kor 12,13). La sperto, tamen, al ni diras, ke ekzistas multaj pekoj kontraŭ la unueco. Kaj ni ne pensu nur al la skismoj, sed ankaŭ al la malĝustaĵoj, kiuj estas sufiĉe komunaj en niaj komunumoj, al la "paroĥaj" pekoj, tiuj en niaj paroĥoj. Foje, fakte, niaj paroĥoj, vokataj esti lokoj de kun-

divido kaj kunuleco, estas markitaj de vera envio, ĵaluzo, malsimpatioj... Klaĉado estas ĉiam surloke. Kiom oni klaĉas facile en la paroĥoj! Tio ne estas bone. Se iu estas elektita prezidanto de iu (eklezia) asocio, oni tuj klaĉas pri li. Kaj se iu virino fariĝas katekizestrino, la aliaj virinoj kontraŭ ŝi parolaĉas. Sed tio ja ne estas Eklezio! Tion oni ne devas fari, tion ni ne faru! Mi ne diras al vi, ke vi fortranĉu vian langon, tion ne... Necesas peti al la Sinjoro la gracon ne fari tion. Tio ĉi plej ofte okazas, kiam ni celas la unuajn lokojn; kiam ni metas en la mezon nin mem, kun niaj personaj ambicioj kaj kun nia vidpunkto kaj ni prijuĝas la aliulojn; kiam ni rigardas la mankojn de niaj gefratoj anstataŭ vidi iliajn talentojn; kiam ni pli multe emfazas tion, kio nin disigas, ol tion, kio nin kunigas...

Iam, en la diocezo, en kiu mi havis antaŭe, mi aŭskultis interesan kaj belan komenton. Oni parolis pri iu maljuna sinjorino, kiu dum sia tuta vivo laboris en la paroĥo, kaj la persono, kiu ŝin bone konis, diris: "Tiu ĉi sinjorino neniam iun priklaĉis, pri neniu ŝi disvastigis kalumniojn; ŝi ĉiam havis rideton". Tian virinon oni povus sanktproklami morgaŭ, ĉu ne? Ĝi estas bela ekzemplo. Kaj se ni rigardas la historion de la Eklezio – kiom da dividoj estas inter la kristanoj! Ankaŭ hodiaŭ ni estas dividitaj. Ankaŭ en la pasinteco ni kristanoj faris militon inter ni pro teologiaj diferencoj. Nun mi pensas al tiu de la "30 jaroj". Sed tio ja ne estas kristana. Ni estas kristanoj, ĉu ne? Ni devas ankaŭ labori por la unueco de ĉiuj kristanoj, iri laŭ la vojo al la unueco, kiun Jesuo volas kaj por kiu Li preĝis.

Rilate tion, ni devas serioze konsciencekzameniĝi. En la kristana komunumo la disiĝo estas unu el la plej gravaj pekoj, ĉar el la Eklezio ĝi faras ne la signon de la Dia efikado, sed la efikadon de la diablo, kiu estas, laŭ ĝia difino mem, tiu, kiu disi-



gas, kiu pereigas la rilatojn, kiu subŝovas antaŭjuĝojn... La dispartigo de la kristana komunumo, ĉu temu pri lernejo aŭ paroĥo, aŭ iu eklezia asocio, estas tre grava peko, ĉar ĝi estas verko de la diablo. Dio kontraŭe volas, ke ni kresku kapablaj reciproke nin akceptadi, pardonadi kaj nin ami, por ke ni laŭeble plimulte similu al Li, kiu estas kunuleco kaj amo. En tio baziĝas la sankteco de la Eklezio: ke ni ekkonas, ke ni estas kreitaj laŭ la Dia bildo kaj ke ĝi estas plenigita de lia mizerikordo kaj graco.

Karaj geamikoj, ni lasu en niaj koroj eksoni tiujn ĉi vortojn de Jesuo: "Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj" *(Mat 5,9).* Sincere ni petu pardonon pro ĉiuj fojoj, kiam ni estis kaŭzo de divido aŭ miskompreno interne de niaj komunumoj, bone sciante, ke ne eblas atingi kunulecon alimaniere, ol pere de konstanta konvertiĝo. Kaj kio estas konvertiĝo? Ĝi estas la peto al la Sinjoro de la graco ne kalumnii, ne kritiki, ne disvastigi klaĉojn, al ĉiuj deziri bonon. Ĝi estas la graco, kiun la Sinjoro donacas al ni. Ĝi estas la konvertiĝo de la koro. Kaj ni petu, ke la teksaĵo de niaj ĉiutagaj rilatoj povu fariĝi respegulo pli kaj pli bela kaj ĝoja de la rilato inter Jesuo kaj lia Patro.

**_En la 100-a datreveno de la eksplodo de la unua mondmilito Papo Francisko omaĝis al la mortintaj soldatoj en du militaj tombejoj de Italio_**

# "LA MILITO DETRUAS, ĜI ESTAS FRENEZAĴO"

"Ĉi tie mi povas nur diri, ke la milito estas frenezaĵo", per ĉi tiuj vortoj la 13-an de Septembro Papo Francisko komencis sian predikon dum la meso celebrita en la tombejo de Redipuglia (en la nordorienta itala regiono Friulo-Venecio Julia), kie estas la tomboj de 100.187 italaj armeanoj falintaj dum la unua mondmilito. Antaŭe li vizitis la tute apudan aŭstri-hungarian tombejon en Fogliano, kie li iradis preĝante meze de la multaj tomboj de la soldatoj kaj lasante florbukedon.



*Papo Francisko iras preĝante tra la tomboj de la aŭstri-hungaria tombejo en Fogliano (Italio)*

"Ni homoj", daŭrigis Francisko, "estas vokataj kunlabori kun Dio en lia kreado. Sed la milito renversas ĉion, ankaŭ la ligojn inter gefratoj. La milito estas frenezaĵo. Ĝia evolu-plano estas la detruo".

La vortoj de la Papo estis netaj, malmolaj, doloraj, eldiritaj en loko, kiu, kiel malmultaj, povas elvoki la doloron estigitan de la armiloj: "Avido, netoleremo, povodeziro estas la motivoj de milito. Pravigitaj, tamen, de ideologio aŭ de la respondo de Kaino: kiel mia frato interesu min? Ĉu mi estas lia gardisto?".

Kaj cent jarojn post la eksplodo de la unua mondmilito, la datreveno, pro kiu Francisko vizitis la du norditaliajn militajn tombejojn, ni ankoraŭ militas: "Ĝi estas la tria mondmilito". Ili estas la vortoj, kiujn la Papo jam diris al la ĵurnalistoj dum la revenvojaĝo el Koreio: "Ankaŭ hodiaŭ, "li deklaris, "post plia mondmilito, verŝajne oni povas paroli pri tria mondmilito, batalata 'popece', kun krimoj, masakroj, detruoj".

"La frontpaĝoj de la ĵurnaloj", li aldonis, "devus havi la titolon: 'Kiel tio interesu min?'. Kiel Kaino".

La milito priatentas neniun, rimarkis kun amareco Francisko: "Sed kiel tio interesu min?". Rigardante la tombojn, li substrekis: "Ĉiuj ĉi personoj havis siajn amataĵojn, siajn revojn. Sed iliajn vivojn oni dispecigis. Kial?". Malmola demando, post kiu estis malmola respondo: "Ĉar la homaro diris: kiel tio interesu min?".

Sed male la Evangelio de Kristo "instruas prizorgi la fraton", diris la Papo, kiu poste invitis memorigi la multajn "viktimojn" tie entombigitajn. La viktimojn de ĉiuj militoj; ne forgesi la funebradojn kaj la dolorojn.

"Ankaŭ hodiaŭ la viktimoj estas multaj. Kiel tio eblas?", li demandis al si kaj demandis al ĉiuj. "Ĉar", estis lia respondo "malantaŭ la kulisoj aktivas geopolitikaj interesoj, avideco je mono kaj povo, la industrioj de la armiloj. Ĉiuj estas potenculoj kaj armilo-entreprenistoj, en kies koroj estas skribite: 'Kiel tio interesu min?'".

Verŝajne ili riĉiĝas, sed "ilia koro estas koruptita, perdis la kapablon plori. Kiel Kaino. La ombro de Kaino kovras nin ĉi tie kaj oni vidas tion ankaŭ dum niaj tagoj".

"Mi petas al vi ĉiuj kaj por ni ĉiuj", finis la Papo, "la konvertiĝon de la koro. Ni devas transiri el 'Kiel tio interesu min?' al la ploro. La homaro bezonas plori kaj la nuna estas la horo de la ploro".


*La unua mondmilito komenciĝis la 28-an de Julio 1914 per la militdeklaro de Aŭstrio kontraŭ Serbio kaj finiĝis pli ol 4 jarojn poste, la 11-an de Novembro 1918. La milito koncernis la pli grandajn mondajn potencojn de la epoko: oni mobilizis pli ol 70 milionojn da viroj en la tuta mondo (60 milionojn nur en Eŭropo) por tiu, kiu rapide fariĝis la plej vasta milito en la historio ĝis tiam, kun la morto de pli ol 9 milionoj da personoj ĉe la armeanoj kaj preskaŭ 7 milionoj da viktimoj ĉe la civila loĝantaro, ne nur pro la militaj operacoj, sed ankaŭ pro la kuntrenitaj efikoj: malsatego kaj epidemioj.*

*Post ĝia fino, la tiuepokaj ĉefaj mondaj imperioj – germana, aŭstri-hungaria, otomana kaj rusa – ĉesis ekzisti kaj el ili naskiĝis ŝtatoj, kiuj komplete ŝanĝis la geografion de Eŭropo.*

## 100a datreveno de la morto de Claudius Colas, la IKUE-pioniro pereinta dum la 1-a mondmilito

*En la komencaj tagoj de la unua mondmilito, inter la multaj soldatoj, kiuj pereis en la batalkampoj, estis la juna Claudius Colas, tre aktiva esperantisto, kunfondinto de IKUE, organizinto de niaj Kongresoj, reviviginto de Espero Katolika post la malsaniĝo kaj sekva morto de ĝia fondinto, pastro Peltier.*

*Jen la lastaj E-istaj agadoj, de li plenumitaj dum sia lasta vivomonato, priskribitaj de la vasta artikolo (*) aperinta felietone en EK de 1976. En la monatoj antaŭ ol soldatiĝi li estis tre laboranta por la 5-a katolika E-Kongreso en Lurdo.*



***Claudius Colas kun la E-flago (1909)***

Pli arda ol iam, kun talenta organizemo, Colas preparis frue la 5-an Katolikan Esperanto-Kongreson en Lurdo kaj de la 15-a ĝis la 19-a de Januaro 1914, li estis surloke. Li kontaktis Monsinjoron Schoepfer, episkopon de Tarbes kaj Lourdes, kiu akceptis patroni la kongreson. En daŭro de nur kelkaj tagoj, li solvis preskaŭ ĉiajn detalajn programerojn, kiujn li povis prezenti jam en la februara numero de sia gazeto «L'Espérantiste Catholique».

La Pilgrimo-Kongreso devis okazi de la 12-a ĝis la 16-a de Aŭgusto, t.e. tuj post la 10-a Universala Kongreso en Parizo. Colas deziris, ke partoprenu en Lurdo plej granda nombro da hispanoj kaj portugaloj, kies landoj estas proksimaj al la kongresurbo. Varbcele, li projektis serion da paroladoj en la ĉefaj urboj, sed lia sanstato, ne tre bona, estus certe malhelpinta lin, kiam telegramo lin devigis reiri hejmen: lia 3-a fileto: François, naskiĝis.

Projektinte, por profesia laboro, vojaĝon al Kanado tuj post la kongreso de Lurdo, li frue sciigas ke volonte li farus, je tiu okazo, propagandajn paroladojn en la franclingva Kebek-provinco.

Sed necesis, ke li aktivu ankaŭ por la katolika partopreno en la triumfpromesanta 10-a Universala Kongreso en Parizo.

Li zorgis por aranĝoj de diservoj en la Baziliko «La Sankta Koro» kaj en la katedralo «Nia Sinjorino»; li aranĝis viziton ĉe la katolika pres-entrepreno «La Bonne Presse» kun akceptiĝo de la arkiepiskopo de Parizo, Kardinalo Amette.

Preskaŭ 4000 samideanoj aliĝis al la 10-a Universala Kongreso, rekorda nombro. Nur la plej vasta spektaklejo de Parizo: la «Palaco Gaumont» povis konveni, dank' al haloj, salonoj al la diversaj fakejoj: ekspozicejo, oficiala poŝtoficejo, librobudoj k.t.p. Colas plej zorge instalis la katolikan ekspoziciеton. Li klopodis, por ke ĉiuj katolikaj libroj, broŝuroj, gazetoj kaj aliaj dokumentoj paradu sub plej arta fotografaĵo de la Sankta Patro Pio la 10-a, kun, sube, citaĵo de liaj vortoj favoraj al Esperanto.

La 10-a Universala Kongreso devis esti sukceso, la Patrona Komitato estis prestiĝa: mondfamaj scienculoj, renomaj beletristoj, konataj politikuloj k.t.p., kiuj agnoskis per klaraj deklaroj la valoron de nia lingvo, konsiderante ĝin sociala realeco.

Ve! Fulmotondre, la tagon antaŭ la malfermo de la kongreso, je la 16-a horo, la ĝenerala mobilizado estis afiŝata en Parizo.

Ni ne detaligos kiel, la postan tagon, la 10-a Universala Kongreso malfermiĝis kaj fermiĝis en unusola seanco, post ol la milito ĵus estis proklamita.

«Jam ne plu estas tempo kongresi, sed defendi la Patrolandon. Adiaŭ! Mi foriras. Vivu Francujo!». En la peza tragika etoso, responde al tiuj vortoj de Colas, manoj anglaj, ĉeĥaj, rusaj, danaj, etendiĝis al li: «Vivu Francujo!». Haste, li ankoraŭ skribis kelkajn leterojn al amikoj, instrukcias, por repagi la sumojn ricevitajn por la kongreso en Lurdo kaj, malgraŭ la kruela forŝiriĝo disde siaj edzino kaj tri knabetoj, li pretiĝas oferi sian vivon.

La 10-an de Aŭgusto kun sia bataliono de ĉasistaj infanterianoj li paŝadas tra la Elzaca kamparo. Antaŭ nelonge, okaze de la morto de la franca poeto kaj patrioto Paul Déroulède, Colas publikigis en grava pariza ĵurnalo franclingvan poezion, kiu aludis pri tiu franca teritorio, kies grundon la kampanjo havis taskon reakiri...

Ĉiam volontulo por danĝeraj misioj, li elĉerpis siajn fortojn; pro absceso ĉe piedo li devis enhospitaliĝi en Langres. Post resaniĝo, li revenis al sia bataliono operacanta en la batalo ĉe Marno.

La 11-an de Septembro 1914, antaŭpostene, ĉe defendota pasejo preter la fervojo, kun kelkaj soldatoj sub lia komando, li ekvidas proksimiĝantan taĉmenton. Por certiĝi pri ĝia nacieco, li sin malŝirmas kaj starante ekkrias: «Jen germanoj, mi klare distingas ilin, pafadu!». Tiam kuglo frakasas lian kapon kaj li falas sur la relo-balaston.

Li ankoraŭ ne estis 30-jara.

Lia kapitano enterigis lin la morgaŭan tagon sub rozarbetoj en la ĝardeneto de la domo de la fervoja bariergardisto en Sompuis (Departemento Marne).

La sekvantan jaron, lia vidvino akompanata de sia plej aĝa fileto, pilgrimis kun sacerdoto Comptour, kapelpastro de la Katolika Esperantista Grupo de Parizo, al la modesta lignokruco signanta la tombon de Claudius Colas.

***M. Delcourt kaj J. Amouroux***

*(*) Oni povas legi la kompletan tekston en la Interreto je la adreso:*

http://www.esperokatolika.org/ek19761980/ek1976_02.htm#8

**Hans Hermann Henrix**

# LA DUA VATIKANA KONCILIO KAJ ĜIA SIGNIFO POR LA RILATO DE LA EKLEZIO AL LA JUDARO

## DUA PARTO

## II. La rilato al la judaro: Temo de la koncilio kaj la historio de ĝia efikado

*La juda mondo reagis unue seninterese al la anonco de la Koncilio fare de Johano la 23-a. Tio ekŝanĝiĝis kun la progresantaj preparadoj por la Koncilio. En la unua prepara fazo la temvorto judismo aperis nur du fojojn, sed ja kun kontraŭaj intencoj. 19 profesoroj de la jezuita Papa Biblia Instituto en Romo faris petskribon kaj substrekis la neceson eviti kaj kontraŭbatali la antisemitismon. Kaj itala episkopo – la tuta episkoparo en la unua prepara fazo estis petita prezenti proponojn por la koncilia interkonsiliĝo – en sia voĉdono faris la mirigan proponon kondamni la framasonismon kontrolitan de judoj. Sed krome ne aperis intervenoj por temigi la rilaton de la eklezio al la juda popolo kaj al la judismo. Ke tiu temigo tamen okazis kaj fine ne nur trovis judan intereson, sed staris ankaŭ en la fokuso de centraj, intensaj kaj dissentemaj debatoj interne kaj ekstere de la koncilia aŭlo, estas ŝuldata al Papo Johano la 23-a persone.*

### 1. La korvasteco de Johano la 23-a

En siaj jaroj kiel apostola delegato por Turkio kaj Greklando kun sidejo en Istanbulo (de 1935 ĝis 1944) Papo Johano la 23-a, la tiama Episkopo Angelo Giuseppe Roncalli, estis atingita de la okazaĵoj de la nazia persekutado al la judoj. La fuĝo de multaj judaj virinoj kaj viroj el la okupitaj teritorioj iris tra Balkanio. Turkio fariĝis transir-lando de ne malmultaj judaj rifuĝantoj. **Episkopo Roncalli estis en kontakto kun la Jewish Agency, kiu donis profesian rifuĝhelpon. En la jaroj 1942 kaj 1943 li intervenis kontraŭ la deportado de grekaj kaj slovakaj judoj. Kun Reĝo Boris la 3-a de Bulgario li ankaŭ pledis por la bulgaraj judoj kaj helpis kunage kun turkaj aŭtoritatoj al judaj rifuĝantoj en Turkio. Tiel li savis judajn rifuĝantojn de la ekstermo.** Precipe al tio rilatigis sin israelaj nekrologoj post la morto de Papo Johano la 23-a je la pentekosta lundo, la 3-an de Junio 1963, kiuj honoris lin kiel "veran justulon de la mondo, kies korvasteco kaj respekto al la homaro ... etendiĝis ankaŭ al la juda popolo."

Kiel Papo, Johano la 23-a konfirmis sian estimon al la juda popolo kaj judismo. En la unua pasiona kaj paska festotempo post sia elektiĝo al papado de la 28-a de Oktobro 1958 li ŝanĝis la tradician propeton por la judoj dum la Sankta Vendredo. Dum jarcentoj tiu preĝo komenciĝis per la peto: "Oremus pro perfidis Judaeis – Ni preĝu por la nekredantaj judoj" kaj en la sekvanta teksto parolis pri "judaicam perfidiam". Tiun ĉi esprimon kiel ankaŭ la adjektivon "perfidus" Johano la 23-a nuligis. Ambaŭ esprimojn multaj generacioj da preĝantoj en la diversaj lingvoj komprenis en la senco de "perfida" aŭ "juda malfideleco", kio sendube prezentis ofendon al la juda popolo. Krome la Papo forigis el la katolika liturgio ankaŭ aliajn malafablajn menciojn pri la juda popolo.

Sed kiel Papo li ne kontentiĝis per la nuligo de negativaĵoj. La 17-an de Oktobro 1960 la Papo akceptis grupon de amerikaj judoj. Dum studvojaĝo de United Jewish Appeal tra Eŭropo kaj al Israelo la ĉ. 130 personoj



vizitis la Papon, por danki lin pro liaj savklopodoj en la tempo kiel apostolan delegaton en Turkio. Post ilia mencio de tiu tempo, la Papo en improvizita parolado memorigis, ke en speciala kazo li sukcesis doni helpon, kiam terura katastrofo proksimiĝis. Ŝipo plena de judaj infanoj el Rumanio estis trarompinta la germanan blokadon kaj enveturinta la havenon de Istanbulo, kie ĝi estis haltigita. Por eviti konflikton kun Germanio, Turkio decidis resendi la ŝipon, kio por la infanoj signifus la morton. La apostola delegato Roncalli intervenis kun granda emfazo. Post multaj malfacilaj kontaktoj la turka registaro konsentis, ke la ŝipo povu porti la infanojn al sekura loko – interveno, pro kiu la tiama ĉefrabeno de Jerusalemo dankis eksplicite per aparta vizito en Istanbulo.

Al tiu memorigo la Papo aldonis konsideron rilate al rakonto de la Biblio, kiu ĉiam kortuŝis lin: Jozefo, altranga administranto de la faraono de Egiptio, post intertempa apliko de ruzaĵo, malkaŝis sin al siaj fratoj kun la elvoko: "Mi estas Jozefo, via frato" (Gen 45,4). Al la judaj vizitantoj estis klare, ke la Papo per tio aludis al sia dua nomo Jozefo kaj volis esprimi sian personan solidarecon kun siaj gastoj kaj ilia popolo.

Se oni rigardas al la priskribitaj gestoj kaj agoj de la Papo, aperas konvinka la pritakso de Johannes Oesterreicher, la koncilia konsilanto por demandoj de la judismo, kiu opiniis: *La vera fonto por la decido, sugesti al la Koncilio la eldonon de deklaracio pri la rilato de la Eklezio al la juda popolo, estas ... la koro de Johano la 23-a, precipe ĝia ensentiĝo en la judan suferadon.*

La korvasteco, la el ĝi originanta engaĝiĝo per agado kaj solidareco kaj la spontanea gesto de atentemo en la persono de Papo Johano la 23-a disrompis la vualon de antaŭjuĝo, malafableco, ja malamikeco en la rilato de la katolika Eklezio al la juda popolo kaj judismo. Tio estis necesa, por ke en tiu rilato sur katolika flanko povis komenciĝi renovigita eklezia kaj teologia pripensado. Kaj tamen necesis ekpuŝo de ekstere, por ke la rilato de la Eklezio al la judaro fariĝu eksplicita temo de aparta dokumento de la Dua Vatikana Koncilio.


## 2. Ekpuŝo de ekstere kaj ĝia evoluigo

Tiu ekpuŝo de ekstere estas ligita kun la nomo de Jules Isaac (1877 – 1963). La franc-juda historiisto estis perdinta edzinon kaj infanojn en Aŭŝvic kaj demandis sin, kiel la ŝoaho povis okazi en Eŭropo, kiu dum tiom da jarcentoj estis kristana. Do li esploris la radikojn de la kristana malamikeco kontraŭ la judoj kaj trovis la kaŭzon en "doktrino de malestimo". Li metis al si la vivotaskon, kunagi ĉe la superado de tiu malfeliĉa tradicio. Jam en 1947 li partoprenis en la konferenco de Seelisberg. En la svisa Seelisberg rezultis alvoko de la evangeliaj, katolikaj kaj judaj konferencanoj al la Eklezioj, revizii sian sintenon, katekizadon kaj instruadon rigarde al la prezentado de la judismo. Jules Isaac

tiucele evoluigis la tezojn, kiuj fariĝis la kerno de la Seelisbergaj tezoj.

Pere de la episkopo de Aix-en-Provence la 13-an de Junio 1960 okazis renkontiĝo de Jules Isaac kun Papo Johano la 23-a. Ĉe tiu okazo la juda scienculo transdonis al la Papo memorandon kaj dosieron. Fine de la aŭdienco Jules Isaac demandis la Papon, ĉu li rajtas kunpreni certan esperon, post kio Johano la 23-a diris: “Vi havas kaŭzon por pli ol espero”. Post la vizito de Isaac la Papo komisiis Kardinalon Augustin Bea, la prezidanton de la mallonge antaŭe kreita sekretariato por la akcelado de la unueco de la kristanoj, per la ekzamenado de la dosiero kaj eblaj konkludoj el ĝi por la interkonsiliĝo de la Koncilio. Laborgrupo de la sekretariato por unueco plu daŭrigis tiun taskon. Ĝia klopodado en Decembro 1961 gvidis al mallonga koncepto de la koncilia deklaracio *De Judaeis*. La intencita eldiro de la Koncilio pri la rilato al la juda popolo baldaŭ post sia publikiĝo envolviĝis en la proksim-orientan konflikton. Arabaj ŝtatoj protestis kaj faris premon sur la kristanaj minoritatoj de la regiono. Ĉiuj vatikanaj certigoj, ke temas pri teologia kaj ne pri politika demando kaj eldiro, ne povis trankviligi la politikan medion. Sekvis drameca historio de la teksto.

La unua koncepto en Junio 1962 estis forstrekita de la tagordo. Per interveno de Kardinalo Bea ĉe Johano la 23-a la temo mem restis sur la taskolisto de la Koncilio, sed nun ĝi fariĝu parto de la dekreto pri la ekumenismo. Al la versio, prezentita al la dua sesio la 18-an de Novembro 1963, estis antaŭmetita enkonduko al la aliaj religioj. Johano la 23-a estis mortinta la 3-an de Junio 1963, kaj lia posteulo Paŭlo la 6-a post sia papa elekto la 21-an de Junio 1963 montris sian volon konservi la temon. Ne okazis interkonsiliĝo pri ĝi, sed ja forta alparolo de Kardinalo Bea en la koncilia aŭlo, ke la renovigo de la sinteno al la judaro apartenas al la klopodado de la Koncilio.


*Kard. Augustin Bea (1881-1968)*

Tio estis konfirmita per la surpriza pilgrimo de Papo Paŭlo la 6-a al la Sankta Lando de la 4-a ĝis la 6-a de Januaro 1964. Nur tria teksta versio fariĝis temo de interkonsiliĝo la 28-an kaj 29-an de Septembro 1964 en la koncilia aŭlo dum la tria sesio. Konciliaj partoprenantoj, precipe el Azio, petis plivastigi la deklaracion je eldiroj pri la islamo, budhismo kaj hinduismo. Ilia postulo ricevis nerektan subtenon per la intertempe publikigita enckliko *“Ecclesiam suam”* de Aŭgusto 1964, en kiu Paŭlo la 6-a parolis pozitive pri la aliaj religioj. Tiel sekvis nova prilaborado kaj kvara teksta koncepto sub la titolo “Deklaracio pri la sinteno de la Eklezio al la nekristanaj religioj”. Ĝi ricevis en voĉdono multan konsenton, sed denove ankaŭ kritikon. La voĉoj de polemiko kaj de protesto en arabaj landoj ne eksilentis. La teksto ricevis pliajn ŝanĝojn, sed poste en solena fina voĉdonado la 28-an de Oktobro

1965 estis akceptita kun 2221 jesaj kaj 88 neaj voĉoj.

### 3. La akceptita koncilia teksto "Nostra Aetate" kaj ĝia efikado

La teksto *"Nostra Aetate"* estas unika novaĵo en la historio de la Eklezio, de ĝiaj koncilioj kaj de ĝia teologio. Per sia artikolo 4 ĝi prezentas fundamentan ŝanĝopunkton en la rilato kaj sinteno de la Eklezio al la juda popolo kaj judismo. Oni povas resumi ĝiajn centrajn eldirojn jene: Pripensante sian propran misteron la Eklezio ektrovas sian profundan ligitecon kun la juda popolo. Tiu spirita ligiteco apartenas al ĝia identeco. Ĝi ricevis la revelacion de Izraelo. El la juda popolo venas Kristo, el ĝi originas la apostoloj. Kun Paŭlo la Koncilio konfesas, ke la promesoj al Izraelo plu validas kaj la judoj restas amataj de Dio; la Diaj gracdonacoj kaj Lia voko ja estas nerepreneblaj. La komuna spirita heredaĵo postulas reciprokan estimon. Kristana katekizado kaj prediko ne rajtas prezenti la judojn kiel kondamnitajn de Dio. Ĉia manifestado de antisemitismo estas malaprobita.

Kelkfoje oni povas aŭdi, ke la katolika Eklezio refalas malantaŭ la sintenon kaj la eldirojn de la Dua Vatikana Koncilio. Ekzistas signoj, ke tio en kelkaj rilatoj fakte estas danĝero, kiu konsciiĝas ĝuste rigarde al jubileo de la 50 jaroj post la solena inaŭguro de tiu Koncilio. Tamen rilate al la koncilia deklaracio *"Nostra Aetate"* kaj ĝia efikado oni povas diri ion tre alian: La tie fundamentita sinteno havas la Papojn kiel siajn protektantojn kaj "plenumantojn". Daŭrigante la heredaĵon de Johano la 23-a, Paŭlo la 6-a traktis la aprobadon de la koncilia deklaracio tre serioze kaj starigis komisionon por la religiaj rilatoj al la judoj. Tiu publikigis en 1974 "direktivojn kaj atentigojn por la plenumado de la koncilia deklaracio *'Nostra Aetate'*, artikolo 4" kaj nun, laŭ pli ol 40-jara tradicio de Internacia katolika-juda interliga komitato, estas partnero de la Internacia juda komitato por interreligiaj konsultiĝoj. Sed precipe Johano Paŭlo la 2-a maturigis la akceptadon de la koncilia deklaracio *"Nostra Aetate"* kaj donis al la sinteno de la Eklezio rilate al la juda popolo kaj judismo novan kvaliton kaj konsiston.

Kiel centrajn deklarojn de la papa rigardo al Izraelo laŭ Johano Paŭlo la 2-a oni povas konstati: La Malnova Ligo kun Moseo neniam estis nuligita de Dio. La juda popolo ankoraŭ nun staras en nerevokebla vokiteco kaj estas ankoraŭ ĉiam heredanto de tiu elektiĝo, al kiu Dio estas fidela. Ĝi estas vere la "Popolo de la Ligo". Rigarde al sia suferado en la ŝoaho ĝi havas mision antaŭ la tuta homaro kaj ankaŭ antaŭ la Eklezio. La Sankta Skribo de la Eklezio ne povas esti disigita de tiu popolo kaj ĝia historio. La fakto, ke Jesuo estis judo kaj lia medio estis la juda mondo, ne estas simpla kultura hazardo. Kiu volus dissolvi tiun ligon kaj anstataŭigi ĝin per alia religia tradicio, tiu perdus la identecon de la persono de Jesuo Kristo kaj atakus la verecon de la enkarniĝo de la Filo de Dio mem. La juda religio estas por la Eklezio ne io "ekstera", sed apartenas en certa senco al la interno de la kristana religio. Al ĝi la Eklezio kaj la kristanoj havas rilatojn kiel al neniu alia religio. La judoj estas "niaj privilegiitaj fratoj kaj, tiel oni certasence povus diri, niaj pli aĝaj fratoj". La antisemitismo estas peko kontraŭ Dio kaj la homaro.

La doktrinaj deklaroj ricevis sian propran komentarion en la grandaj gestoj de Johano Paŭlo la 2-a. Antaŭ ĉio du okazaĵoj profunde impresiĝis al la memoro de la mondo: lia historia vizito al la roma sinagogo la 13-an de Aprilo 1986 kaj, kiel kulmino de la gestoj de tiu papado rigarde al la juda popolo, la vizito al Israelo kaj Jerusalemo de la 21-a ĝis la 26-a de Marto 2000. Johano Paŭlo la 2-a esprimis sian respekton kaj sian estimon

al la juda popolo per impresaj gestoj kaj simboloj kiel ankaŭ per teologie gravaj eldiroj.

Lia posteulo Papo Benedikto la 16-a post sia elekto la 19-an de Aprilo 2005 plurfoje manifestis sian volon, rezolute daŭrigi la vojon laŭiritan de sia antaŭulo. Tamen lia rilato al la judoj suspektiĝis pro la – de li decidita – malnova-nova propeto por la judoj dum la Sankta Vendredo en la jaro 2008 kaj pro la nuligo de la ekskomuniko de la kvar episkopoj de Frataro Pio la 10-a, ŝarĝita pro malamikeco al la judoj, en la jaro 2009. Necesis gravaj signoj kiel lia vizito al Israelo de la 11-a ĝis la 15-a de Majo 2009 kaj fundamentaj deklaroj kiel ĉe lia parolado al la juda komunumo de Romo la 17-an de Januaro 2010, por forigi tiun suspekton kaj restarigi la konfidon en la juda-katolika rilato.

## Konkludo

**La deklaracio *Nostra Aetate* havas unikan lokon en la Dua Vatikana Koncilio. Kiel la plej mallonga teksto, precipe pro la dinamiko de la akceptado dum la papado de Johano Paŭlo la 2-a, ĝi fariĝis – el vidpunkto de efikado – la eble plej signifa dokumento de la Koncilio, ja de la katolika Eklezio en la 20-a jarcento entute.** Aliaj Eklezioj sugestiĝis per *"Nostra Aetate"* en sia propra sinteno al la juda popolo kaj judismo, same kiel ankaŭ inverse ili efikis sugeste al la katolika-juda rilato. **Plie, *Nostra Aetate* estas koncilia teksto "montranta al la estonteco", kiu havas sian pluan efikadon en la estonteco ankoraŭ fronte al si.** Inter la kristanaj teologoj partoprenantaj en la kristana-juda dialogo ekzistas la firma espero, kiu samtempe estas sindevigo, ke "la plej mallonga teksto de la Koncilio pli pli fariĝos la kompaso de la eklezie kredanta agado en la 21-a jarcento". Ĉar aldone al la efikado al la rilato de Eklezio kaj judaro, *Nostra Aetate* instigis, samtempe akcelis renovigojn de la eklezia vivo kaj de la teologio, kiuj entute estis gravaj deziroj de la Dua Vatikana Koncilio: nova estimo al la Malnova Testamento kiel Vorto de Dio, la ekkono de la judeco de Jesuo kiel ankaŭ la sentemo por la juda aliro al Dio kaj Lia Ligo, sed ankaŭ por la rilato de la materiaj kaj spiritaj dimensioj de la vivo kaj la kompreno de la saviĝo en kaj de tiu ĉi mondo. Per tio la kredo povas gajni je realisma enhavo kaj enmonda pruviĝo. Se tio okazas, ĝi havas antaŭ si viglan estontecon.

**Prof. d-ro Hans Hermann Henrix**

**Noto pri la Aŭtoro.** Docento pri teologio kaj ekumeno, de 1988 ĝis 2005 li estis direktoro de la Episkopa Akademio de diocezo Aachen (Germanio). La fokuso de lia teologia laboro estas ekumenismo, kun, aldone, speciala rigardo al la demandoj pri la rilatoj inter kristanismo kaj judismo. Ekde 2003 li estas konsultanto de la Komisiono por la religiaj rilatoj kun la judaro ĉe la Papa Konsilio por la unueco de la kristanoj. Li estas unu el la pli renomaj fakuloj de la interreligia dialogo en la germanlingvaj regionoj. La artikolon tradukis D-ro Klaus Perko el la revuo "Dialog – Du Siach", n-ro 91, aprilo 2013, Vieno (Aŭstrio), eldonita de la Kunordiga Komitato por kristana-juda kunlaborado.

**Rimarkoj de la tradukinto.** La originala teksto havas pli ol 30 piednotojn kun detalaj font-indikoj. Por ŝpari lokon, ili estas forlasitaj en la traduko. Se iu havas specialan intereson pri ili, ni povas disponigi al li la originalan tekston en germana lingvo.

Cetere, jam en la sama numero de Aprilo 2013 aperas mallonga noto, ke Papo Francisko tuj en la komenco de sia papado certigis al la juda komunumo de Romo sian solidarecon. "Mi vigle esperas, ke mi povos kontribui al la progreso, kiu okazis en la rilatoj inter judoj kaj katolikoj ekirante de la Dua Vatikana Koncilio", tekstas lia letero al la roma ĉefrabeno Riccardo Di Segni. La letero portas la daton de la papa elekto. Francisko parolas en ĝi pri "renovigo de la kunlaborado en la servo al mondo, kiu laŭ la volo de la Kreinto povas fariĝi pli kaj pli harmonia".

**D-ro Klaus Perko**


# LA 20-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

Kristanaj esperantistoj el 15 eŭropaj landoj kolektiĝis en la tagoj de la 16-a ĝis la 23-a de Aŭgusto 2014 en historie tre grava itala urbo Trento, por la 20-a Ekumena E-Kongreso, kadre de kiu okazis la 67-a Kongreso de IKUE kaj la 64-a Kongreso de KELI. La temo de la kongreso estis citaĵo el la Unua Letero de la Apostolo Paŭlo al Korintanoj (1 Kor 1,13) "Ĉu Kristo estas dividita?




*En akceptejo fratoj Carlo Sarandrea kaj Giovanni Daminelli akceptas familion Ambrosetto*

La kongreso okazis en la Centro Mariapoli en la vilaĝo Cadine, apartenanta al la urbo Trento. Temas pri la ekumena centro *"Movimento dei Focolari"* (Movado de Fajrujoj). La tuta konstrukomplekso estas konstruita sur monta deklivo. La Centro Mariapoli estas ligita kun la fondintino de la "Movado de Fajrujoj" Chiara Lubich (1920-2008), kiu estis ĝia unua prezidantino.




*La unuan Sanktan Meson sabate vespere celebris pastro Pierluigi Svaldi el Italio*

Sabaton la 16-an de Aŭgusto post alveturo de la kongresanoj okazis je la 18-a horo Sankta Meso en la katolika kapelo de la Centro. Poste sekvis vespermanĝo kaj interkona vespero kun vespera preĝo en la salono Athenagoras. Dum la tuta kongreso estis uzata ekumena kant- kaj preĝ-libro Adoru: du el ĝiaj gravaj kunaŭtoroj ĉeestis la kongreson – pastroj Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger el Germanio.



*Inaŭgura alparolo de D-ro Giovanni Daminelli*

Dimanĉon la 17-an de Aŭgusto antaŭtagmeze post komuna kantado okazis solena malfermo de la kongreso kun enkondukaj salutoj de la prezidantoj de IKUE frato D-ro Giovanni Daminelli el Italio kaj de KELI frato Philippe Cousson el Francio. Por



*Inaŭgura alparolo de Philippe Cousson*

prezento de la movado ĉeestis du gravuloj de la Centro – ĝia prezidanto Roberto Lago kaj la sekretariino s-ino Annalisa Pacchetti.

Post la solena malfermo okazis dimanĉa ekumena Diservo en la salono Athenagoras, kiun prezidis pastro Bernhard Eichkorn kun pastoro Wolfram Rohloff ambaŭ el Ger-



*Alparoloj de la ĉefuloj de Centro Mariapoli*

manio.

Posttagmeze prelegis frato Philippe Cousson rilate al la kongresa temo: "Kio post 500 jaroj de disiĝo". Sekvis prelego de fratino Marija Belošević: "Dekreto pri Ekumenismo – 50 jaroj de Unitatis Redintegratio". Kaj post kunsidoj de la apartaj estraroj okazis en la kapelo dimanĉa Sankta Meso.

Lundon la 18-an de Aŭgusto okazis matene Sankta Meso por la Unuigo de la Kristanoj kaj post ĝi ekumena preĝo. Post la komuna kantado venis vizite la episkopo de la diocezo de Trento Mons-reo Luigi Bressan por saluti la kongresanojn. Interesa estis lia alparolo. Fine li kun la kongresanoj kantis esperantlingve (antaŭ multaj jaroj li iom konatiĝis kun Esperanto). Poste okazis du prelegoj. Kiel unua prelegis frato Giovanni Daminelli "Pri la Koncilio en Trento". Post li prelegis fratino Norma Cescotti pri "La vivo en Trento dum la Koncilio".

Posttagmeze okazis perbusa ekskurso al Rovereto, kie ekzistas la plej granda sonorilo de la mondo – la sonorilo de la milit-falintoj. La vojon al la sonorilego ambaŭflanke borderas multegaj flagoj de la ŝtatoj. En halo s-ro Alessandro Martinelli – direktoro de la Ekumena Centro de Trento akompananta la kongresanojn, informis pri la historio de ekesto de la sonorilego fandita el bronzo de la armiloj el la unua mondmilito. La plej granda kaj plej forte sonanta sonorilo en la mondo nomita Maria Dolens pretigita en la jaro 1925 estis refandita en la jaroj 1939 kaj 1965. En 1965 ĝin benis Papo Paŭlo la 6-a, en Vatikano de kie ĝi estis transportita al Rovereto. Sur la sonorilo, kiu estas 3,36 m



*Komuna kantado kun la episkopo de Trento, Monsinjoro Luigi Bressan*



*La kongresanoj dumvizite al Rovereto sub sonorilego Maria Dolens*

alta, pezas ĉirkaŭ 23 tunojn kaj diametras 3,21 m, estas gravuritaj la vortoj de Papo Pio la 12-a: "Nenio estas perdita kun la paco. Ĉio povas esti perdita per la milito". Rovereto estis dum la 2-a mondmilito preskaŭ totale detruita. Dum la reveno okazis vizito al la ortodoksa preĝejo de sanktaj ĉefanĝeloj Miĥaelo kaj Gabrielo en urbo Borgo Sacco.

Mardon la 19-an de Aŭgusto okazis matene Sankta Meso por Paco kaj Justeco. Post komuna kantado okazis aparte Jarkunvenoj de IKUE kaj KELI. Entute la kongreson partoprenis 70 personoj, el ili proksimume po duono anoj de IKUE kaj KELI.

Mardon posttagmeze denove okazis perbusa ekskurso. Celo estis la surroka sanktejo de Sankta Romedio kaj apudaj vidindaĵoj. Laŭ legendo la ermito Romedio sin preparis rajde perĉevale por viziti la episkopon de Trento. Lian ĉevalon mortigis sovaĝa urso. Romedio ordonis seli la urson anstataŭ la mortigitan ĉevalon. La urso iĝis malsovaĝa kaj Romedio rajdante per ĝi povis viziti la episkopon en Trento. Surmure antaŭ enirejo estas skribaĵo: "Admirinda ago aŭ stranga afero! La urso, la sovaĝbesto fariĝas homa estaĵo. Pli granda surprizo, ke la estaĵo naskita kiel homo, nun ofte estas ŝanĝata je sovaĝbesto". Fakte ekzistas tie du sanktejoj, sur la suba estis konstruita la supra. La surmonta sanktejo de Sankta Romedio situas sur roko alta 99 metrojn. Revenante okazis halto ĉe digo de akvobaraĵo alta 152 metrojn.



*Sankta Romedio kun la malsovaĝa urso*

Vespere okazis kultura programo de la grupo "Brainstorm", por kelkaj kongresanoj tro sovaĝa programo.

Merkredon la 20-an de Aŭgusto okazis tuttaga ekskurso al urbo Merano. Unue estis vizitita hebrea templo – la sinagogo konstruita en 1901. En la malsupra etaĝo lokiĝas hebrea muzeo.

Transirinte la riveron okazis vizito alprotestanta preĝejo. Fronte estas statuo de



*Promene en la tre bela urbo Merano*

Jesuo Kristo. La interno ne estas multe dekoraciita; ofte tie okazas orgenkoncertoj aŭ prezentoj de religia muziko.

Tagmeze en la restoracio okazis tagmanĝo kun nekutima manĝaĵo, kontraŭ kiu per tranĉilo kaj forketo luktis la kongresanoj. Temas pri bakitaj porkaj ripoj kaj genuo.

Sekvis vizito de la belega urbocentro kun Katedralo de Sankta Nikolao. Poste komen-ciĝis privata trarigardo de la urbaj vidindaĵoj, kiuj estas multaj. Post duono de la 19-a jarcento Merano transformiĝis en turisman internacian centron.

Vespere okazis plua kultura programo kun la muzika ensemblo "Il Tamburo del Sole" (la tamburo de la suno), ludanta muzikon "klezmer" (el la juda tradicio). La tuta bela tago estis finita per vespera preĝo.

Jaŭdon la 21-an de Aŭgusto matene okazis en la kapelo Sankta Meso. La tempo inter la matenmanĝo kaj tagmanĝo estis dediĉita al pluraj interesaj prelegoj. Unue prelegis la komitatano de IKUE frato Stefan Lepping pri la nuntempe tre grava temo: "Pri la aktuala kaj mondvasta tiel nomata Genrisma Ideologio – Gender Mainstreaming" Post li prelegis fratino Paola Giommoni pri la komunumo "Monaĥejo de Bose", kaj fine Marija Belošević prelegis pri "Diversaj kristanoj en retejo".

Ĵaŭda posttagmezo apartenis al vizito de



*En la Ekumena Centro de Trento*

la historie grava urbo Trento. Unue la kongresanoj kolektiĝis en la Dioceza Ekumena Centro por ekumenaj kaj interreligiaj dialogoj. Ĝian estigon iniciatis Papo Paŭlo la 6-a. Sur la Katedrala Placo estas fama fontano de Neptuno. La plej grava konstruaĵo estas la Katedralo de Sankta Vigilio, la tria episkopo de Trento (381-400). Sur la origina katedralo estis en la 11-a jc. konstruita nova katedralo kaj en 1212 rekonstruita. En 1563



*En Trento dumire al la Katedralo de S. Vigilio*

la koncilio finiĝis post multaj jaroj kaj interrompitaj sesioj: la inaŭguro estis okazinta en 1545, kun la klopodo reunuigi la kristanajn ekleziojn post la protestanta Reformacio.

Alia grava preĝejo ligita kun la Koncilio estas la sanktejo de Sankta Maria la Granda, en kiu okazis pluraj konciliaj sesioj. En la franciskana preĝejo de sankta Laŭrenco apartenanta al la samnoma Abatejo okazis la kongresa evangeliana Diservo kun la Sankta Manĝo.



*Evangeliana Diservo en la preĝejo de S. Laŭrenco*

Vendredon la 22-an de Aŭgusto post la Sankta Meso honore al Maria Reĝino, ekumena preĝo kaj komuna kantado, okazis la lastaj prelegoj. “Pri la unua mondmilito” prelegis frato Siegfried Krüger, pri “Konsideroj pri disiĝoj kaj paciĝoj” prelegis frato Stefan Lepping kaj pri “Přemysl Pitter – lia vivo kaj verko” prelegis frato D-ro Petr Chrdle. Dum libera posttagmezo okazis kunveno de la IKUE-estraro. Vespere okazis la programo de la tradicia adiaŭa vespero. Fine venis momento por danki al la triopo de la kongresaj ĉefaranĝantoj gefratoj D-ro Giovanni Daminelli, Norma Cescotti kaj pastro Pierluigi Svaldi. Lastan vesperan mediton kaj preĝon gvidis fratino Éva Farkas el Hungario, samkiel dum ĉiuj kongresaj vesperoj.



*Vespera medito kaj preĝo fare de Eva Farkas*

Sabaton matene okazis latinlingva Sankta Meso laŭ malnova trenta liturgio kiel dank-esprimo por la belega kongreso en la koncilia urbo Trento. Celebris pastro Bernhard Eichkorn. Sekvis la ekumena preĝo, komuna kantado kaj fermo de la kongreso. Grupo da kongresanoj, kiuj atendis la buson al Prago, povis pasigi la sabatan posttagmezon en la E-klubo de Trento. Antaŭvespere ili partoprenis dimanĉan liturgion en la preĝejo de Sankta Petro, kiun celebris por la kongresanoj la jam konata episkopo de Trento Monsro Luigi Bressan. Ĝi estis belega finiĝo de nia restado en Trento.



*El la tradicia programo de la adiaŭa vespero*

Mil dankojn meritas krom Dio kaj ŝirmanta nin Dipatrino Maria la menciitaj kongresaj ĉefaranĝintoj, la mescelebrintaj pastroj, la muzikisto frato Stefan Lepping, la prelegintoj kaj ĉiuj, kiuj kontribuis al estigo de la frateca medio kaj senproblema okazigo de la kongreso. **Miloslav Šváček**

# LA TURO DE DAVIDO

La Savinto laŭ la Dia promeso devis naskiĝi el gento de Davido. Kaj la gento de Davido havis vicon da generacioj. Oni povus atendi, ke el ĉiu generacio naskiĝos la Savinto. Sed la Eternulo elektis ne nur la tempon konvenan laŭ sia volo, sed Li elektis ankaŭ junulinon konvenan kaj puran ankaŭ laŭ sia volo kaj en la ĝusta tempo tiu junulino koncipis. Ĉu Ŝi estis alia ol la junulinoj, ŝiaj samaĝulinoj? Ĉu Ŝi estis alia ol la junulinoj antaŭ aŭ post Ŝi en la gento de Davido?

Jes, estis. Ŝi estis tiu elektita, Ŝi estis preparita. Tiamaniere Ŝi superis la ceterajn anojn de la gento de Davido. Sed tiu supereco ne estis en senco de la fiereco aŭ eĉ superrangeco. Ŝi superis ilin pro sia elektiĝo fare de Dio. Se ni prezentos al ni la genton de Davido kiel grandan urbon, grandegan urbon, en kiu ĉiu ano de la Davida gento estas iu konstruaĵo, poste la Virgulino Maria estas turo inter tiuj konstruaĵoj. La turo, kiu tiujn ceterajn konstruaĵojn superas. Kaj ĉiu konstruisto al ni konfirmos, ke la turo devas havi multe pli profundan kaj pli fortikan fundamenton ol ĉiuj ceteraj konstruaĵoj, kiuj ĉirkaŭ tiu turo staras. Tiel estis ankaŭ kun la Virgulino Maria.

Ŝi ne estis ordinara konstruaĵo en la urbo de Davido. Ŝi estis la turo, kiun konstruis la Eternulo sur de Li konstruitaj fundamentoj.

La turo havas du taskojn: la unua estas tiu, ke ĝi estu de malproksime videbla. Por ke ĝi jam de malproksime informadu, kie la urbo situas. La homo, kiu serĉas, orientiĝas laŭ iuj punktoj. Unu el tiuj punktoj en la urbo estas la turo. La Virgulino Maria kiel la turo de Davido estas por ni ankaŭ tia orientiga punkto.

La dua tasko, kiun havas la turo, estas tiu, por ke tiuj, kiuj supreniros ĝis ĝia supro, vidatingu la malproksimon. Atingi la supron de la vivo de Maria signifas trairi tra la vivo de Maria ekde la bazo. Kaj paŝon post paŝo, ŝtupon post ŝtupo antaŭiĝi ĝis la supro de la vivo de Maria.



Kiam la kristano surgrimpos ĝis tien supren, kaj estas tio la vojo sekura, ĉirkaŭrigardos, ekvidos ne nur la urbon, ekvidos ne nur la tradicion de la gento de Davido, ĝian historion, sed li ekvidos ankoraŭ pluen. La Virgulino Maria al ni do havigas kaj la orientigan punkton en la vivo, kaj la eblecon supreniri pli proksimen al la ĉielo. Tio estas la tasko de la turo. Kaj el tiu ĉi loko pli proksima al la ĉielo malsupren rigardi kaj vidi tion, kio per surtera irado estas por ni nevidebla. La Virgulino Maria estas ne nur la orientiga punkto por la kristana vivo, sed ankaŭ elvidejo, kiu ebligas al ni vidi malproksimen kaj post malsupreniro el la supro de la turo de Maria, ni scias, kiudirekten ekiri.

La turo de Maria staras jam du mil jarojn. Ĝi staras firme, ĉar ĝi staras sur la firmaj fundamentoj. En tio estas por ni la Virgulino Maria ankaŭ modelo. Se devas ĉio, kion ni en nia vivo konstruas, stari firme kaj longe, ĝi devas esti konstruita sur honesteco, sur la kredo, ĝi devas esti konstruita sur la valoroj, kiuj estas neskueblaj. Ili estas la valorecoj de Dio. Ankaŭ en tiu ĉi komparo de Maria kaj la turo ni povas vidi pluan simbolon, kiu estas por la kristana vivo tiel grava. Stari firme sur la bonaj fundamentoj. Alti ne pro tio, ke ni aliulojn superu, sed ke ni al ili ebligu la elvidon. Por ke ni ankaŭ kiel la kristanoj estu por la erarvagantoj kaj migrantoj lumturo, kiun oni povas atingi kun la espero.

**Max Kašparů**

**MOVADAJ INFORMOJ**


# GRAVA SACERDOTA JUBILEO DE PASTRO PRELATO STANISŁAW PAWLACZEK

La 50-an jubileon de sia pastriĝo festis la 28-an de Junio 2014 la animzorganto de la katolikaj geesperantistoj en Vroclavo (Pollando) pastro prelato Stanisław Pawlaczek. De 30 jaroj li estas paroĥestro de preĝejo de la Plejsankta Virgulino Maria sur Sablo (na Piasku) en Vroclavo kaj de 1986 li estas la animzorganto de la vroclavaj geesperantistoj, por kiuj li celebras Sanktajn Mesojn ĉiumonate. Ĉiuj memoras lian animzorgan aktivadon dum la Kongreso de la Esperantistoj-fervojistoj en Karpacz, dum la Somerferiado en Szczawno-Zdrój kaj dum la 19-a Ekumena E-Kongreso en Vroclavo (2009).

Pastro prelato Stanislavo Pawlaczek estas homo tre serena, komprenema, humila kaj per sia tuta koro sindona al tiuj, kiujn li priservadas. Lia sacerdota agado estis kaj restas multfaka kaj varia.

Post la fino de la studoj ĉe la fakultato pri kristana filozofio (specialiĝo filozofia-socia) de la Katolika Universitato en Lublino, li fariĝis en 1970 asistanto de la Katedro de la Socia Filozofio ĉe la Supera Porpastra Seminario en Vroclavo kaj li konservas tiun taskon ĝis la nuntempo.

Dum la jaroj 1970-1984 li estis ankaŭ prefekto de la Porpastra Seminario. Estante lekciisto ĉe la Katedro de la Socia Instruo de la Eklezio li lekciis ankaŭ en Porpastra Seminario en Bagno (1974-86), en la Seminario en Paradyż (1986-92) kaj en la Porpastra Seminario en Legnica (1986-92).



*Pastro Pawlaczek predikas al la E-kongresanoj de 2009 en la preĝejo de V. Maria sur Sablo*

Malfacile estas mencii ĉiujn sacerdotajn servadojn kaj aktivadojn de la jubileulo. Pro ĉiuj liaj multnombraj aktivadoj la 17-an de Oktobro 2008 li estis honorigita per Ora Indec-Kruco fare de la tiama Ŝtatprezidento de Pollando. Lia sinoferema priservado meritas dankemon kaj rekonon flanke de la Pola Sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj de la Estraro de IKUE.

**Zdzisława Każmierczak**

## LEGANTOJ SKRIBAS

**Pri Pastro Metzger —** Estas tre laŭdinde, ke sur paĝo 18 *(de EK 1-3/2014, ndlr)* estas la atentigo "Max Josef Metzger ne forgesita". Jes ja, je la 1-a de Aprilo nunjare ni memoru, ke antaŭ 70 jaroj li estis ekzekutita. Mi en 1944 estis 15-jarulo kaj en la jaro 1948 mi eksciis kaj eklernis Esperanton kaj pli poste ankaŭ informiĝis pri Max Josef Metzger kaj lia agado por paco kaj ekumeno. De nia kara E-amiko Walter Mudrak siatempe (1990, 1997) mi ricevis gazetan materialon koncerne Metzger. Mi mem konservas krome diversajn aĵetojn pri li. **Anton KRONSHAGE**, *Germanio*

**Informado pri IKUE —** Kun plezuro mi informas vin (ĉar ankaŭ vi helpis al mi) pri la ekfunkciado de la IKUE-informtabulo en mia paroĥo. Mia laboro por informado en mia paroĥo parte estas finita. Nun mi lasas tempon por ago de la Sankta Spirito. Se la loko kaj parokanoj estas konvenaj, mi pensas, ke la Sankta Spirito donos al ni novan grupon de IKUE en Aleksandrov Lodzki. Ĉi-dimanĉe miaj religiaj laboroj por IKUE estis direktitaj al alia loko: Krasnojarsk en Ruslando. Ĉu tio ĉi estas influo de la Sankta Spirito je mia persono, mi vidos baldaŭ. Ĉi-dimanĉe en mia paroĥo Sanktan Meson celebris Misiisto el Regiono Krasnojarsk. Post la S. Meso mi iomete parolis kun li, mi montris al li mian informtabulon kaj mi donis al li libreton: "Rozmówki Esperanckie". Mi petis lin: instigu katolikaj rusoj al fondo de IKUE grupo en via paroko. Mi promesis helpon de niaj IKUEanoj. **Stanislao STASZEWSKI**, *Pollando*

**Malgraŭ malfruado… —** Alte estimataj gesamideanoj! Antaŭ kelkaj tagoj mi bonorde ricevis pakaĵeton kun multaj eldonoj de EK el la lastaj jaroj (postaj liveraĵoj). Dankegon pro tio. Spite al ties malfruiĝo la enhavo estas ĝenerale tre interesa kaj leginda. **Heinz PLATZER**, *Aŭstrio.*

# RENKONTIĜO EN PILGRIMLOKO SVATÝ KOPEČEK, ĈEĤIO


Kiel ĉiujare, ankaŭ nunjare, okazis semajnfina renkontiĝo de la Katolika Sekcio de Ĉeĥa E-Asocio kaj la Ĉeĥa IKUE-Sekcio. La renkontiĝo okazis dum la semajnfinaj tagoj de la 12-a ĝis la 14-a de Septembro 2014 en la fama pilgrimloko Svatý Kopeček u Olomouce (Sankta Monteto apud Olomouc). La pilgrimloko Sankta Monteto estas alloga ne nur pro sia historio kaj situo kaj beleco, sed ĝi estas ankaŭ grava, ĉar la 21-an de Majo 1995 tie okazis la renkontiĝo de la junularo kun Papo Johano Paŭlo la 2-a.



La renkontiĝon partoprenis tridek esperantistoj inkluzive de gastoj el Slovakio kaj Germanio. Gastigantinoj de la renkontiĝo estis la fratulinoj premonstraninoj, en kies spiritekzerca domo de la ordena konstruaĵo Norbertinum oni loĝis kaj okazis apartaj programeroj.

Vendredon, post alveturo kaj loĝigo de la renkontiĝantoj, la ĉeestantoj partprenis sanktan meson en la kapelo dediĉita al Nomo de la Virgulino Maria kaj la meso estis celebrita honore al Ŝi ĝuste en la festotago de la Nomo de la Virgulino Maria. Sekvis interkona vespero kun projekcio de la prezentaĵoj pri la okazintaj IKUE-aranĝoj.

Sabaton matene la ĉeestantoj partoprenis la sanktan meson kune kun fratulinoj premonstraninoj en la kapelo de ilia klostro. Antaŭtagmeza tempo estis dediĉita al vizito de historiaj monumentoj de urbo Olomouc, post ĉefurbo Prago la plej riĉa urbo je historiaj monumentoj en Ĉeĥio. Posttagmeze okazis la Konferenco de la IKUE-Sekcio kun la elekto de nova sekcia komitato por la plua trijara balot-periodo. Prezidanto post kvaronjarcenta prezidantado de frato Miloslav Šváček iĝis premonstrata diakono Doc. ThDr. MUDr. Mgr. Max Kašparů PhD; vicprezidanto Inĝ. Jan Kalný; sekretario, kasisto kaj redaktoro de Dio Benu Miloslav Šváček. Frato Jaroslav Chodníček estis elektita kiel membro de la sekcia komitato kaj kontrevizoroj iĝis Jiří Studený kaj Jindřich Tomíšek. Kiel rekonon de lia 25-jara oferema prezidanteco estis al s-ano Miloslav Šváček aljuĝita la titolo de Honora Prezidanto. Post la konferenco okazis tre interesa faka prelego de frato Max Kašparů, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el E-kluboj de Olomouc kaj Přerov. Post la vespera rozaria preĝo okazis plua projekciado pri la nunjaraj gravaj aranĝoj: Bibliaj Tagoj 2014 en Tuchoměřice apud Prago kaj la 20-a Ekumena E-Kongreso okazinta en Trento.



*Novelektita sekcia prezidanto diakono D-ro Max Kašparů*

Dimanĉon matene okazis babilado dum kiu la ĉeestantoj informis pri la E-agadoj en siaj E-kluboj. La restanta tempo antaŭ la dimanĉa sankta meso estis eluzita por projekciado pri la 66-a Kongreso de IKUE okazinta en 2013 en la pola pilgrimloko Kalwaria Zebrzydowska.

La solenan pilgriman sanktan meson la ĉeestantoj partoprenis en la belega pilgrima Baziliko de la Vizito de la Virgulino Maria. Post ĝi kaj post tagmanĝo estis la semajnfina renkontiĝo fermita.

La partoprenantoj de la renkontiĝo en la centro Norbertinum, situanta tuŝapude de la Baziliko, estis kontentaj pro komforta loĝigo, bongustaj manĝoj kaj la tuta interesa programo. Ĉiuj do adiaŭis kontentaj.

**Miloslav Šváček**